

Ora Ĵurnalo

Numero 54, Septembro 2022



La domo Merkurhuset

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Kune kun Carina kaj Bellman ĉirkaŭ Hisingen	31
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	La ĉaskastelo de la reĝino Kristina.....	34
Espeporko meditas.....	3	Malnova afiŝo pri la diversaj horoj bezonataj por flue paroli fremdajn lingvojn	35
Ĝenerala elekto al la sveda parlamento la 11an de septembro	4	Kelkiom el esperantista vivo.....	35
Brita ĵurnalisto spertas tagojn en okcidenta Svedio	4	Renkonti 33 gelernantojn en gimnazia klaso en Schillerska, Gotenburgo.....	37
Estrarano de SEF vizitis la gotenburgan klubon.....	10	Ĉu vi vere amas katojn?.....	38
Albumo: Tago ĉe Gunnebo kun la Gotenburga Esperanto-Asocio	13	Mirinda Prago!	38
Eta Karlo	19	Junaj artistoj havas grandan fantazion.....	39
Ripozu ĉe ĉi tiu fonto.....	20	"Fiolmannen" – La viro kun la violono.....	39
Poemeto	22	Svedaj pioniraj virinoj	41
La ruĝdorsa lanio – Törnskatan.....	23	Ĉe la enigmo de vivkreiĝo.....	41
Svedoj estas la plej longdaŭre sidantaj homoj en Eŭropo.....	24	Kometo en Muminvalo	43
Letero al Inga Johansson pri nova projekto.	24	Informilo – monata gazetoj de E- handikapuloj	44
Okcidenta Saharo kaj Svedio.....	25	Internacia literatura Esperanta konkurso "Hristo Gorov-Hrima"	44
Historio de la unua sukerkubo en la mondo	27	Veckovisa esperantokurser online (på engelska)!.....	45
		Nia amikino de la librorondo	45

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53
32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo:
Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



Malnova aerfoto de Stannum, Vänersborgs museum



Espeporoko meditas



- 🍂 **Bibliotekoj** ĉiam estas interesaj. Povas esti la privata Jan Myrdal-biblioteko en Varberg kun pli ol 50 000 libroj aŭ eta kelo en Stannum kun pli modesta stoko.
- 🍂 Somero estas la tempo por **palacvizitoj**. Kiam ni havis viziton de Ann-Louise de la SEF-estraro, ni montris al ŝi du palacetojn – Gunnebo kaj Nääs.
- 🍂 Post ĉiu Esperanto-Sabato en Gotenburgo ekde la 10a de septembro **okazos reala libro-rondo**. Ne ĉiuj ŝatas Zoom-kunvenojn. Ni elektis la libreton *Katrina malfruas* de Sten Johansson, origine skribita en Esperanto en facila teksto.
- 🍂 Tamen Zoom bonas por tiuj, kiuj ne havas eblecon veni al klubejoj. Lunde 17–18 h. estas **daŭriga kurso. Komencanta kurso** okazas merkrede 18.30–19.30. Ambaŭ kursoj uzas la libron EPOGo. Nia stoko baldaŭ estos je la fino. Ni bezonas novan eldon-kvanton!
- 🍂 La unuan de septembro mi staris antaŭ **33 gelernantoj en la gimnazio Schillerska**, Gotenburgo, kaj povis disponi 70 minutojn por Esperanto-informo. Tiajn longajn lecionoj plenkreskuloj ne havas en

studrondoj, sed tiuj gejunuloj estis mirindaj. Neniu ekdormis! 😊

- 🍂 Esperanto havas multajn "vizaĝojn". Okazas ke oni tediĝas je unu vario de ĝi, sed tiam oni povas trovi **novan aspekton de la fenomeno Esperanto**. Por Bertil Nilsson estis KEF, kiu inspiris lin.
- 🍂 Ĉu **Okcidenta Saharo** neniam havos liberecon de Maroko? Kial Svedio kaj aliaj Eŭropaj landoj silentas kaj ne postulas ke UN energie laboru por la liberigo de "la lasta kolonio en nia mondparto?"
- 🍂 **Sukeron** ni evitu pro la sano de niaj dentoj, sed la interesan historion pri la unua sukerkubo ni ne evitu!
- 🍂 Ŝipveturo ĉirkaŭ la gotenburga urboparto Hisingen – kiu fakte estas insulo – tion ofertas al ni **nova kunlaboranto** – Carina Schwartz. Bonvenon!
- 🍂 **Ĉu ni frostos dum la venonta vintro** pro manko de elektro? Eble, sed multaj landoj havos pli gravan situacion. Spektu la tabelon pri elektraĵaj prezoj de eŭropaj landoj.
- 🍂 Havu varman aŭtunon! /Siv



Aŭtunaj hajkoj

La revo por mia vivo paliĝas
sed la sovaĝaj lilioj
lumas kiel ĉiam

Shūshiki-jo



La aŭtuna luno brilas
per sia plej bona lumo
kompatindaj steletoj

Deikin

Ĝenerala elekto al la sveda parlamento la 11an de septembro




La dekstraj kaj la maldekstraj partioj ekvilibras. La debatoj inter la partiestroj estas duraj. Post la rezulto de la elekto ili ja devas interkontrakti por formi sufiĉe fortan registaron. Por TV-spektantoj povas ŝajni ke ĉiuj volas la saman – plibonigi la edukon, la flegadon, la zorgadon, la bonstaton. Ili ĉiuj volas batali la krimecon.

Ankaŭ la defendo de nia lando estas aktuala temo. Jes, estos streĉa elekto!

Svenska elpriser jämfört med Europa

Månadsmedelpris per område (euro per MWh) i juli 2022



Källa: Nordpool. Grafik: Martin Olsson/Newsworthy

NyTeknik

Sufiĉe nova temo estas la subita alteco de la prezoj por elektro.

Ĉu ni frostos la venontan vintron? Ĉu la industrioj povas daŭrigi kiel antaŭe pro la manko de elektra energio? Ĉu estis saĝe malŝalti parton de la nuklea energio?

Sed kompare kun aliaj eŭropaj landoj Svedio tamen havas sufiĉe bonajn kondiĉojn. Legu la tabelon apude (el interreto). Temas pri la averaĝa prezo monate.

La politikaj partioj konkuras por trovi la pli bonan solvon ... /Siv

Brita ĵurnalisto spertas tagojn en okcidenta Svedio



Donald Gasper estas brita ĵurnalisto – dum multaj jaroj havante laborejon en Hongkong. Nun li loĝas en Londono. Li parolas plurajn

lingvojn, inter ili la ĉinan, sed ankaŭ interesiĝas pri planitaj lingvoj – kaj li ankaŭ lernis aprezi la azian kuirarton. Multaj ne

sufiĉe bone parolis la anglan kaj Donald ankaŭ estis instruisto pri la angla.

La temo por la esperanta kunveno estis: Volapuko, Esperanto kaj Interlingua.

Inter liaj fontoj ankaŭ troviĝas "Planspråket som överlevde" av Karl-Gustaf Gustafsson. Tiun libron li do fakte legis svede. Mirinde!

Mardon mi venis al la flughaveno Landvetter por venigi lin al mia hejmo. Ĉar estis multaj jaroj de lia antaŭa vizito al Gotenburgo, mi ne

certis ĉu mi rekonus lin. Pro tio mi kunportis esperantan flagon. Estis amaso da homoj je tiu horo. Infanoj demandis al mi – De kiu lando devenas la verda flago? Ankaŭ du plenkreskuloj alparolis min. Virino kaj mi eksciis ke ni iam estis studentoj en la Per Brahe-gimnazio en Jönköping, sed ne samtempe.

Se mi dezirus novajn geamikojn aŭ nur interparolon kun fremduloj, mi nur status en Landvetter kun la esperanta flago ŝajnante ke mi atendas esperantiston.

Do, Donald venis al Svedio por partopreni Interlingua-kunvenon dum kelkaj tagoj en la popolaltlernejo de Löftadalen, en Åsa, Hallando.

Mi veturigis lin tien, kaj li retrovis siajn samideanojn de Danio, Nederlando kaj Svedio. Krom diskutado kaj planado kun la interlingua grupo Donald faris ekskursojn al Varberg kaj fine al Gotenburgo.

En Gotenburgo mi revidis lin sabate.



Dimanĉe Donald (n:o 2 de la dektra flanko) lunĉis kune kun esperantistoj loĝantaj proksime al Gråbo.

Lunde estis kunveno en la biblioteko de Stannum. Multaj libroj tiam troviĝis en stokejo en alia parto de la domo, kaj la biblioteko aspektis pli bonveniga kaj hela ol antaŭe.

Ingegerd gvidis "malfermitan estrarkunvenon" kaj i.a. ni decidis ke ni havu tri tiajn kunvenojn jare.

Poste ni iris al la malnova bazlernejo de Gunnilse. Ni manĝetis kaj poste Donald prezentis siajn tri elektitajn planlingvojn.



La preĝo "Patro nia" en Volapük, Esperanto kaj Interlingua

Volapük:

O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz nem ola Komomöd monargan ola Jenomöz vil olik, äs in süls, i su tal. Bodi obsik vädeliki givelös obes adelo. E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi, sod aidalivolös obis de bad.

(La fina doksologio mankas.)

Esperanto:

Patro Nia, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo. Venu via Regno. Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton.

(La fina doksologio mankas.)



Venis mardo

Donald estis invitita al Lasse Diding en Varberg, kiun li volis intervjui. Kiel ŝoforo mi ĉeestis.

Lasse Diding estas konata direktoro de la hoteloj Gästis kaj Havanna. Li havas grandan intereson pri Lenin kaj fondis Leninparkon kaj Leninbanejon, kiu ne nur estas banejo kun klasikaj volboj kaj moderna vezikbaseno sed ankaŭ loko por kontemplado kaj legado. Ĉu vi iam aŭdis pri banejo kun ĉambreto de libroj? Ĉu ili bonfartas en tiu humida medio? Jes certe, ĉar la aero cirkuladas.

Lasse Diding kolektas librojn. Por havi lokon por ĉiuj, li fondis privatan bibliotekon, "la Biblioteko de

Interlingua:

Nostre Patre, qui es in le celos, que tu nomine sia sanctificate; que tu regno veni; que tu voluntate sia facite super le terra como etiam in le celo. Da nos hodie nostre pan quotidian, e pardona nos nostre debitas como nos pardona a nostre debitores, e non induce nos in tentation, ma libera nos ex le mal, *quia tue es le regno, e le potentia, e le gloria in sempiterno!*

✠

En la biblioteko de Stannum ni havas ekzemplojn de kelkaj planlingvoj. Esperanto havas ja kelkajn simbolojn por paco, tutmondeco kaj komunikado. Volapuko havas la devizon: Por unu homaro – unu lingvo.



Estas la flugiloj kun Hermes super la tero.



La moderna Interlingua havas la literon i kiel simbolon.





Jan Myrdal". Parto de la granda domo ankaŭ estis loĝejo por Jan Myrdal. Afiŝoj, pentraĵoj kaj personaj aĵoj memorigas nin pri li – ekzemple kuŝas liaj okulvitroj sur la skribotablo, kie li laboris. El la ĉirkaŭ 50 000 libroj 50 estas skribitaj de Jan Myrdal.




El Interreto: Jan Myrdal estis sveda verkisto, skribanto kaj debatanto. Li naskiĝis en 1927 en Bromma kaj mortis en 2020 en Varberg. Liaj gepatroj estis Alva kaj Gunnar Myrdal. Kun sia edzino Gun Kessle, artisto kaj fotisto, ili kunlaboris pri grandaj partoj de sia aŭtoreco.

Kunlabore kun la verkista kolego Henning Mankell kaj la entreprenisto Lasse Diding oni inaŭguris la Myrdal-bibliotekon en novembro 2015. Ĝi estas la plej granda privata biblioteko en norda Eŭropo. La libroj temas pri gravaj sociaj aferoj dum la 20a jarcento sed ankaŭ troviĝas libroj pri arto kaj dramoj. La biblioteko estas malfermita al la publiko.



Pliaj bildoj el la biblioteko



Kelkaj personoj, kiuj esploras kaj skribas pri Jan Myrdal – kaj pri Lasse Diding – havas



eblecon loĝi en la biblioteko. Aliaj nur tempe venas.



La teksto: – Aĉetu bildon kaj apogu la – Myrdal-bibliotekon!

Donald konis unu el la verkistoj, kiuj aperis. Estas amiko de li, kiu ankaŭ laboras/laboris en Hongkong.

Jes la biblioteko vere estas impona. Venas vizitantoj de pluraj landoj.

Jan Myrdal povus kaŭzi grandan dramatikon. Ekz: li manifestaciis kontraŭ la Vjetnam-milito fine de la 1960-a jardeko kaj estis arestita.

Alia ekzemplo: Li deklaris ke oni mem decidu pri sia morto.

Neniam mankis al la gazetoj novaĵoj pri Jan Myrdal.

La teksto sur la afiŝo: La verkisto Jan Myrdal kaj la edzino: Ni ŝparas por memmortigo en mortkliniko en Svislando.





Lasse Diding kondukis nin al sia dua hotelo: Havanna. Tie li regalis nin per bongusta lunĉo.



Troviĝas du ekzempleroj de la skulptaĵo "Virino kun la mansako" (kiel armilo), farita de Susanna Arwin.

Lasse Diding aĉetis unu kaj volis ke la loko de la statuo estu la kastelo de Varberg, sed oni ne akceptis ĝin sur la ŝatata loko.

Ĝi nun troviĝas en la ĝardeno de Lasse. La alia staras en Alingsås.

La fonto de la statuo estas foto de la ĵurnalisto Hasse Runesson, farita dum Novnazista manifestacio.



La enirejo al la hejmo de Lasse Diding havas 12 skulptaĵojn pri virinoj. Ili estas kreitaj de la sama skulptisto, Susanna Arwin, kiu faris "la virino kun la mansako".

Vere estas interesa ideo havi armeon de virinoj ekster sia domo!





Kafo en la altano de Elisabeth Hallin.



Tute alia defendo havas la bibliotekistino de la Myrdal-biblioteko, Elisabeth Hallin. En ŝia ĉarma ĝardeno staras granda blua ĉina hipopotamo.


En 2021 la ĵurnalisto Per Nygren eldonis biografion pri Lasse Diding "Lasse kaj Lenin".

Temas pri la vivo de Lasse kiel hotelposedanto, komunisto, kolektanto. milionulo, provokanto, libroamanto, Varbergano, frankofilo, amanto de Kubo, incitemulo – kaj posedanto de monaĥejo jes fakte monaĥejo. La mondo estas plena de kontraŭdiroj. Kompreneble li renkontis kontraŭstaron. Eĉ se mi ne konsentas kun li pri lia ideologio, mi tamen admiras lian energion, persiston kaj humuron.

Pripensu... kiel estus havi Lasse Diding kiel ambasadoro por esperanto????????????

En la libro *Fejsbok* Lasse kunigis elekton de siaj propraj skriboj en Facebook: "La kapricoj de egocentra homo" – aŭ "En la kapo de hoteldirektoro".

Kiaj interesaj tagoj:



- en Åsa, kie Donald Gasper travivis interlingvajn tagojn
- en Gunnilse, kie Donald en esperanto parolis pri Interlingua kaj Volapuko
- en Varberg, kie Donald intervjuis hoteldirektoron kun proletaj ideoj.

Koran dankon Donald, Lasse kaj Elisabeth! Vi pligrandigis la mondon! /Siv

Estrarano de SEF vizitis la gotenburĝan klubon



Ingegerd kutime dufoje somere "promenigas" nin tra la stratoj en Gotenburgo. Unue la 16an de julio en la urbocentro kaj por la 14a de aŭgusto ŝi preparis ekskurson al la **palaceto Gunnebo en la komunumo Mölndal.**

Unue ni lunĉis. Gunnebo havas terpecojn, kie oni kultivas legomojn por la lunĉoj. Do, tre freŝaj pladoj! Poste Ingegerd paroligis nin. Ĉiu ricevis slipon kun temo, pri kiu ni devis paroli. Eĉ partoprenanto, kiu atendas sian unuan esperantan kurson, sukcesis esprimi sin esperante. Bone!

Estis tre varmega tago. Sidi ekstere ne eblis.

Eta promeno de la restoracio al la palaceto.



Estrarano de SEF, Ann-Louise Åkerlund, akompanis nin (la tria de dekstre).



Jam en 1397 estas skribite pri la ĉarma konstruaĵo. Tempe ĝi estis somerdomo por riĉa gotenburga familio. Se vi volas scii pri la historio, vi povus gli.

Lunde, la 15an de aŭgusto, fariĝis labortago por Ann-Louise, Ingegerd, Sten, Roger kaj mi.

Ni iris al Herrljunga por preni objektojn por ekz. ekspozicioj – sed neniun libron – al la biblioteko en Stannum. La libroj estos transportitaj al Malmö, kiam la ejo en Herrljunga ne plu estos luita.



Jen Ingegerd antaŭ mia aŭto kun bone videbla reklamo.



Jen la iomete laca grupo en picejo en Herrljunga.

Unu plia palaco Ann-Louise povis vidi antaŭ sia vojaĝo hejmen al Helsingborg.

Ni iris al Nääs, sinjorlando kun memoroj de i.a. Selma Lagerlöf.

En "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson" Selma Lagerlöf rakontas pri Nääs.

Ankaŭ la hindu Lakshmiwar Sinha skribis pri Nääs, kien li estis sendita de Tagore por lerni slojdon por poste fondi slojdedukon en Hindujo. Ne maltrafu liajn librojn:

Jaroj sur tero kaj Hindu rigardas Svedion!



La impona enirejo.



Nur originaj mebloj en ĉiu ĉambro. La plej "fama" ĉambro estas la necesejo kun vatitaj vandoj kaj vatita neceseja seĝo. Pliaj informoj se vi guglus.

Do, la vizito de Ann-Louise en Gotenburgo enhavis kaj laboron kaj plezuron.

Bone ke estrarano de SEF vizitas klubojn. Ni vere aprezis tion!

Por la Esperanta klubo de Gotenburgo

Siv



La kuirejo estas tre granda kun lifto por la pladoj.



Albumo: Tago ĉe Gunnebo kun la Gotenbarga Esperanto-Asocio

Ett album: En dag på Gunnebo med Göteborgs Esperantoförening

Vi povas senti, ke vi alfrontas ekscitan tagon ĉe Gunnebo, la malnova somera dometo, kiu travivis ĝis nia tempo kun sia historio.

Man anar att man står inför en spännande dag på Gunnebo, den gamla sommarstugan, som stått sig ända in i vår tid med sin historia.



Ann-Louise el Elsinburgo aliĝas al ni en ĉi tiu aventuro kun tagmanĝo kaj montrado de la kastelo. Ŝi estas vere bona esperantistino.

Ann-Louise från Helsingborg gör oss sällskap på detta äventyr med lunch och visning av slottet. Hon är verkligen en god esperantist.

Erika kun sia mojosa promenbiciklo ĝuas la sunplenan someran tagon de Gunnebo kune kun bonaj amikoj en la Gotenbarga klubo.

Erika med sin tuffa gåcykel njuter av Gunnebos soliga somardag tillsammans med goda vänner i Göteborgsklubben.



Ni ĝoje atendas la lunĉon dum ni prezentas nin kaj atendas la manĝaĵon. Fine venas la kelnerino kaj diras ke "nun estas bone mendi".

Glada väntar vi på lunchen medan vi presenterar oss och väntar på maten. Till slut kommer servitrisen och säger att "nu går det bra att beställa".



Kion ajn ni mendas, fiŝojn, viandon aŭ vegetaran, ni ricevas la plej mirindan tagmanĝon de la somero kun belaj legomoj de la bedoj en la ĝardeno ekstere.

Vad vi än beställer, fisk, kött eller vegetariskt, så får vi sommarens underbaraste lunch med härliga grönsaker från landen utanför.

Siv elektas el la bufedo!

Salato, butero kaj pano estas servataj.

Siv väljer från buffén!

Det serveras sallad smör och bröd.



La komencanto Eva ricevas helpon de Ann-Louise por kompreni kaj praktiki la ekscitan lingvon Esperanto. Kaj Eva kaj Ann-Louise originas el Norrlando.

Nybörjaren Eva får hjälp av Ann-Louise med att förstå och praktisera det spännande språket Esperanto. Både Eva och Ann-Louise har sina rätter i Norrland.

Kreskas tiom ke "knaras" en la plantejoj.

Det växer så det knakar i odlingarna.



Pensu, kiam la malnova familio Hall iris sub la arda suno ĉi tie ĉe Gunnebo! Tiam ja estis aliaj cirkonstancoj...

Tänk när de gamla Hallarna gick under den stekheta solen här ute på Gunnebo! Det var tider det...

Ĉi tie ili vendas la libron "John Hall d.y." de la aŭtoro Sophie Elkan. Ili ankaŭ vendas multajn aliajn objektojn. Belaj aĵoj, bonegaj donacoj.

Här inne säljer dom boken "John Hall d.y." av författarinnan Sophie Elkan. De säljer också mycket annat. Vackra saker, bra presenter.





La lasta posedanto, Hilda Sparre, kiu translokiĝis en Gunnebon en 1889. Estas tre interese aŭdi pri tio.

Den sista ägarinnan Hilda Sparre, som flyttade in i Gunnebo år 1889, är det mycket intressant att höra om.

Interesitaj aŭskultantoj kolektiĝis en la vestejo por esti informitaj antaŭ la rondiro. Tiuj, kiuj bezonas ĝin, povas kunporti malgrandan, malpezan faldseĝon.

Intresserade åhörare har samlats i foajén för att bli informerade inför rundvandringen. De som behöver kan ta en liten lätt fällstol med sig.




Estas tiom multe por vidi, kaj bona ĉiĉerono rakontas al ni.

Det finns så mycket att berätta och vi blir visade runt av en duktig guide.

Nick ĉirkaŭiras inter la 1920aj modeloj portantaj periodajn vestaĵojn.

Nick minglar omkring bland 1920-talsmodellerna som bär tidstypiska kläder.



Tra la fenestroj de Gunnebo, iom supre en la domo, vi komprenas ke la kastelo situas en mirinda loko.

Genom Gunnebos fönster, en bit upp i huset, förstår man att slottet ligger på en underbar plats.

La tablo estas festaranĝita por la tiamaj homoj.

Bordet är festdukat för den tidens människor.



La revuo IDUN estis io por Monica. La agrabla gvidistino volonte montras.

Tidningen IDUN var något för Monica och den trevliga guiden visar gärna.



Nick kaj Filippa alportas "feliĉon" de la diino "Somero", unu el la belaj laŭsezonaĵoj statuoj ĉe Gunnebo.

Nick och Filippa hämtar "lycka" hos gudinnan "Sommaren", en av de vackra årstidsstatyerna på Gunnebo.

Eva revas kaj vivas en la kirloj de danco en la feliĉaj 1920-aj jaroj, kiam ili dancis la Charleston.

Eva drömmar och lever sig in i dansens virvlar i det glada 1920-talet, det var då man dansade Charleston.





La rondiro finiĝis kaj nun ĉiuj iras
sian propran vojon.

Ĉiuj portas multe pli da impresoj kaj
scioj pri la somerdometo Gunnebo,
kiu estas posedata de la urbo
Mölnadal.

*Alla bär på mycket mer intryck och
kunskap om sommarstugan
Gunnebo, som ägs av Mölnadal
stad.*

*Visningen är slut och nu går var och
en åt sitt håll.*

Bildoj kaj tekstoj / Bilder och text:
Ingegerd Granat

Eta Karlo

Lulkanto de
Carl Michael Bellman



86

Lilla Charles, sov sött i frid
UR DIKTER TILL ENSKILDA
Bellmans vaggvisa för sin lille son Charles

Andante
Gm D D7/F# Gm D7 Gm

Lil - la Charles, sov sött i frid, du får tids nog va - ka,
tids nog se vår on - da tid, och hen - nes gal - la sma - ka.

Gm D7/F# Gm D Gm

Vär - den är en sor - ge - ö, bäst man an - da

Cm D Gm/Bb Cm6 D7 Gm

skall man dö och bli mull till - ba - ka.

Carl Michael Bellman

Eta Karlo pace dormu
Ĉar vi devos maldormi
Malican tempon spertos vi
Trinki vi devos galon
Insulo trista estas mond'
Ni spiras tempeton
kaj baldaŭ mortos
kaj poste ni estos polvo.

Bellman skribis la lulkanton "Por mia filo Carl" la 18-an de aŭgusto 1787 kiam li vivis ĉe Stora Nygatan 20 en Gamla Stan, Stockholm.

La lulkanto estis skribita du semajnojn post kiam lia filo Elis mortis pro variolo. La kanto povas esti trovita en malsamaj variaĵoj ĉie en la Nordioj de la 16-a jarcento kaj pluen, la plej malnova sveda variaĵo estas *Ro ro till fiskeskär*.

Kiam Beethoven ricevis komision en 1815 prilabori kaj aranĝi popolkantojn de Eŭropo, *Lullaby to Little Carl* estis unu el la elektitaj pecoj.

En registrado de 1972, la kanto estas prezentita de Monica Törnell. La registrado estas prenita el ŝia debutalbumo Ingica:

<https://music.youtube.com/watch?v=7gQCV7CDoZg>
/Ingegerd

Ripozu ĉe ĉi tiu fonto

de Ingegerd Granat

"Ripozu ĉe tiu fonto" povus esti dirita de la poeto Carl Michael Bellman kiu vivis kaj laboris en la 18-a jarcento. Tempo, kiu estis tiel diferenta vidata tra niaj okuloj. En la Epistoloj de Fredman ili ĉiuj aperas, la figuroj kiuj estis kunfratoj en lia tempo.

Bellman naskiĝis la 4/2 1740 kaj vivis ĝis 11/2 1795.

Li heredis muzikan talenton de sia avo Johan Arent Bellman, kiu dum tempo estis muzikisto en la Kortega Kapelo.



Carl Michael priskribis sian vivon kaj tiun de aliaj en sia poezio kaj multaj estas la personecoj, kiuj aperas en la Epistoloj de Fredman kaj "Fredmans Sångers (kantoj)" kaj en alia poezio.

Kaporalo Mollberg estis unu el la karakteroj kaj havis domon sur Hornsgatan. Li estis fabrikestro en ŝtrumpetoj dum iom da tempo. Li ne sukcesis pri tio kaj tial li fariĝis rajdanto, sen domo, ĉevalo kaj stalo. Li estis dancmajstro dum iom da tempo kaj mortis malriĉa en 1772.

En epistolo numero 69, ni venas sekvi la dancmajstron Mollberg en la taverno, kie la

patro de la taverno kun la kruĉo staras kaj trinketas dum Mollberg mem donas konsilojn pri la dancturnoj. "Do svingiĝu kaj balanciĝu, pli ekvilibru!"

Patro Movitz, (1721–1779) estis restoraciestro. Antaŭe li estis kun la artilerio kie li estis vundita. Kiam li mortis, la basviolono estis lia ĉefa valorajo, kun valoro de 12 ŝilingoj.

Iam Movitz okazigis koncerton ĉe trinkejo "Tre Byttor" kaj tio estas priskribita en la Epistolo de Fredman n-ro 51, "Movitz blovis koncerton".

Ruĝvizaĝa kiel koko nun staris Movitz,
batante la takton kaj piedpremante kaj
kriante:

Blovu aeron de Galupp! "El Galuppi!" ĉiuj tuj
kriegis. Blovu nun, Movitz! Jes. Bone.
Bravissimo!



Johan Fredman, "Jean", horloĝisto en
Stokholmo sen horloĝo, laborejo kaj kapitalo.
Vivis 1712–1767. Li heredis riĉaĵon, sed
mortis en malriĉeco kaj ebrio.

Li priskribis la feliĉan fiŝkaptadon en la kanto
numero 31 de Fredman kiel paŝtistan idilion,
estis ekskursoj, ventoj kaj boatoj en la
somero eĉ por tiuj homoj, kiuj vivis en
Stokholmo de la 18-a jarcento.

"Do eniru la boaton, ni ambaŭ kantis! Amo
regos en nia brusto. Eolo mem indignas, sed
kiam li alarmas, en viaj brakoj estas mia
konsolo.

Feliĉa sur la kolera ondo de la maro, en via
trankvila brakumo mi ne povas kaŝi, kiel en
morto la koro volas vin sekvi. Kantu, sirenoj,
kaj imitu mian voĉon".

Jergen Puckel estis samtempulo kiu laboris je
la Halo-Tribunalo kaj kiu juĝis en disputoj
inter dungantoj kaj dungitoj ekster la
gildsistemo.

Jergen Puckel ŝatas flirti per sia bela ĉapelo
kaj transpreni diversajn eventojn per sia
bunta lingvaĉo, miksita kun sveda, germana
kaj franca, kaskado da vortoj ĉiam dancas
ĉirkaŭ Jergen Puckel kaj fine en la epistolo
numero 73 li preskribas sian animon al la
diablo sin mem.

"Jergen fermentas, li sidas kaj legas en la
kelo: *"Ach ich bin ein elend sinder min
contract till ente går; heert's ein mahl, mik
ferpinder noch zwey år"*.

"Patro Berg" estis edziĝinta al la gastejestrino
Ulla Bergström, li mem estis doganisto kaj pri
li ni povas legi en la Epistolo de Fredman
numero 63, verkita meze de la semajno.

"Patro Bergström, agordu kaj sonoru,
malfermu la ĵaboton por brusto kaj torako, ni
dancos kaj ni svingos en via feliĉa domo.
Donu al niaj junulinoj vinon kaj prunojn kaj
karamelojn; Pimpinella patrino Maja verŝas
en glasojn kaj kruĉojn".



“Ulla Winblad” aŭ Maria Kristina Kiellström, kiu estis la vera Ulla, vivis inter la jaroj 1744 kaj 1798. Ŝi vivis buntan vivon en malriĉa kaj malmorala Stokholmo. Kiel huraistino inter aliaj huraistinoj, ŝi renkontis la tiamajn klientojn ĉe baloj, kie ili dancis. Ulla Winblad estis konstante ĉirkaŭita kaj ŝi estas hele priskribita en multaj el la tekstoj de Bellman. Kia ajn aspektis la realo por Ulla kaj ŝiaj kunfratinoj, ni devas formeti en la angulon de honto pro la malfacila vivsorto de tiu tempo, kie ne estis multaj elireblecoj el malriĉeco kaj vundebleco se vi finiĝos en akcidento.

Ni povas legi en la Epistolo de Fredman numero 71, “Al Ulla en la fenestro ĉe Fiskartorpet, tagmezo, somera tago”:

Ulla, mia Ulla, diru al mi, ĉu mi povas proponi al vi la plej ruĝajn fragojn en lakto kaj vino? Aŭ el la fiŝujo vostumantan karason, aŭ el la fonto akvan supujon? La pordoj estas malfermitaj danĝere de la vento, floroj kaj picebranĉetoj bonodoron donas; rosaj nuboj anoncas la sunon, kiel vi vidas. – Ĉu tio ne estas diece...?

Ni povas fini nian promenadon en la Stokholmaj priskriboj de Bellman per tiu ĉi epistolo, ekstere en la fiŝkaptista bieno en paŝtista idilio, ni povas lasi la sunon brili en la memoro de tiu tempo helpe de multaj Epistoloj kaj Kantoj.



... Tiam ekbrilis la tagoj de Gustaf, mirinda, fremda, ekstravaganca se vi volas, sed suno estis en ĝi, kaj kiel, vi plendas, kie ni estus, se ili ne iam estus? ...

Esaias Tegnér



Poemeto, sendita de Inga Johansson, skribita de Maria Nazaré Laroca

Kion vi vidas?
Ĉu kateton aŭ papilion?
Naturo nin ravas
per la ĉiutaga donaco
de poezia ĉefverko.

Juiz de Fora, 12/08/2022, Brazilo



Maria Nazare Laroca

Poetino, n. 1948, emerita universitata brazila profesoro.


Urbo: Juiz de Fora; ŝtato Minas Gerais; lando: Brazilo

Esperanta poemaro **Penseroj**: <https://katalogo.uea.org/?inf=2692>

En *Brazila Esperanta Parnaso* ŝi estas reprezentita per kvin poemoj (numeroj 66–70). Ŝi publikigis du librojn pri la portugala lingvo kaj du poemlibrojn. Ŝiajn poemojn ŝi esperantigis mem.

La ruĝdorsa lanio – Törnskatan

de Renate Säfström



Ĝi sidis tie ĉe la vojrandoj
kaj lasis sin esti admirata.
Malgranda ruĝdorsa lanio,
somera gastoj el tropika Afriko
kiu nun en aŭgusto komencas
sian longan vojaĝon hejmen.
Bonŝancon en via vojaĝo
vi tiel kompetenta estaĵo.

Vid vĝkanten satt den dār
och lät sig beundras.
En liten törnskata,
sommargäst från tropiska Afrika
som nu i augusti startar
sin långa hemresa.
Lycka till på färden
du så kompetenta lilla varelse.



Svedoj estas la plej longdaŭre sidantaj homoj en Eŭropo



Göteborgs-Posten havas artikolon la 23an de aŭgusto montrante ke plej ofte inter la eŭropanoj svedoj ekzercas sin en "Gym" – sed bedaŭrinde ili ankaŭ estas la plej sidantaj homoj.

Eĉ 5-jaruloj, kiuj ja nature kuras, saltas kaj grimpas, sidas kun platkomputiloj dum tro multaj horoj.

Tabelo montras, kiom oni foruzas energion je ĉi tiuj aktivecoj:

Irado po 4,8 km hore = po 220 kilokalorioj

Irado po 3,2 km hore = po 150

Irado po 1,6 km hore = po 70

Irado supren en ŝtuparo = po 200

Maĉado de maĉgumo = po 20

Stariĝo = po 15

Sidado = po 5

Fonto: Journal of Internal Medicine (Levine JA)

Je multaj laboroj oni tamen estas devige sidi – ekz. se oni kondukas buson, estas sidanta en la kaso de vendejo, aŭ ofte havas laborkunvenojn. Promenadkunvenoj estas nova fenomeno! Rekomendas! Ĉu iomete plibonigus la aferon se busŝoforo kondukante maĉas maĉgumon 😊?

Maj-Lis Hellenius, profesoro je kardio-vaskulara prevento och esploristo en la *Karolinska Institutet*, Stokholmo, rekomendas ke ni stariĝu almenaŭ unu foje ĉiun duonhoron por eviti la negativan spiralon. Ĉiam evitu la lifton, iru per la ŝtuparo anstataŭe! Staru sur unu kruru kiam vi brosas al vi la dentojn! Faru minimume 7000 paŝojn tage.

/Siv

Letero al Inga Johansson pri nova projekto



Estimata s-ino Johansson,
kara samideanino,

Mi estas Frank Lappe el Frankfurto ĉe Majno kaj salutas vin el la UK en Montrealo. Bela urbo, bela lando, bonega kongreso!

Mi ŝatus inviti vin kontribui al libroprojekto. Mi volas prezenti geesperantistojn el la tuta mondo, do ankaŭ vin kaj vian agadon en Esperantujo. Sed en speciala maniero. Ĉu vi ŝatas kuiru? Temas pri kuirlibro. Sed ĝi ne estu nur kolekto de receptoj. Tiaj jam ekzistas multfoje, kiel libroj kaj en la interreto. En

Esperantujo mi konas nur unu kuirlibron, ĝi estas kolekto de receptoj, kiuj jam aperis en "Monato". Mia projekto kaj koncepto estas alia:

1. Ĉiu Esperantisto, kiu kontribuas, prezentas tipan manĝaĵon/pladon el sia regiono (nuna hejma aŭ devena regiono). Do, ne la plado prezentu la tutan landon, sed la regionon, ĉar ĉiu lando/ŝtato ja estas tre diversa laŭ popoloj, lingvoj, geografio kaj haveblaj ingrediencoj.
2. Recepto de la prezentata manĝaĵo kiel mallonga teksto.
3. Foto de la preta manĝaĵo.
4. Ne nepre necesas, sed estus bone, se eblus havi ankaŭ foton de la farado, do la leganto vidas personon aŭ grupon, kiam li/ŝi/ili faras la pladon.
5. Eble eta klarigo pri la tradicioj de la loka kuirado. Anekdotoj kaj kelkaj interesaj informoj estas bonvenaj.
6. La esperantisto (aŭ grupo) estas prezentataj. Li/ŝi mem prezentas sin aŭ mi faras tion laŭ interkonsento. Jen taŭga loko por rakonteti pri la aktivumado en Esperantujo. Sed ĉi tiu amplekso ne nepre necesas. La

minimumo povas esti nur recepto kun foto. Se bona foto ne eblas, mi povas foti tion, post kiam mi re-kuiras la manĝaĵon laŭ la recepto.

Se mi ricevas multajn kontribuaĵojn, la libro povas aperi eĉ en du volumoj aŭ kiel serio. Tiel eblus bildigi la diversecon de multaj manĝo-tradicioj el la tuta mondo.

La tekstoj de la receptoj mem estas kutime tre simplaj, pro tio ili bone taŭgas kiel tekstoj por komencantoj, kiel lernolibro aŭ distra legolibro.

Mi jam ricevis receptojn, prezentojn kaj fotojn el Nederlando, Finnlando, Rumanio kaj Niĝerio, do el tre malsamaj anguloj de la mondo.

Eble vi povas prepari tiun pladon kaj la informojn kune kun via familio aŭ kune kun aliaj Samideanoj el via regiono kiel teama laboro. Aŭ sole.

Kion vi opinias pri tio? Ĉu vi ŝatas kunlabori?

Kore salutas vin

Frank el Frankfurto, momente en Montrealo

frank.lappe(a)yahoo.de



Okcidenta Saharo kaj Svedio

de Lena Thunberg, publikigita 2022-08-14

Nova Polisario-representanto: – Ni atendas aktivan agadon de Svedio.

Mi esperas, ke Svedio revenos al la sinteno pri la problemo de Okcidenta Saharo, kiun oni havis antaŭe, diras Senia Bachir Aberrahman, nova reprezentanto de Polisario Front por Svedio kaj Norvegio ekde julio 2022.

Mi intervjuas ŝin telefone en aŭgusto.

– Ni kaj la tuta mondo estas en malfacila situacio nun konsiderante kio okazas kun Ukrainio, sed ni ne konkuru pri sufero kaj solidareco.

Kion vi atendas de Svedio?

Kiam Svedio decidis ne rekoni Okcidentan Saharon en januaro 2016, oni sentis grandan perfidon. Ni okcidentaj saharanoj estis surprizitaj kaj ŝokitaj. Post ĉio, Svedio rekonis Palestinon, kiu estas okupata de Israelo. Israelo estas multe pli forta ŝtato ol Maroko!

– Mi ŝatus plifortigi la ligan kun Svedio kaj denove alporti la diskuton pri rekono. Post ĉio Svedio estas lando, kiu tre alte respektas internacian juron, malkoloniigon, homajn rajtojn kaj demokration. Kial tiu respekto ne aspektu same alte por ni!

– Estas multaj maljustaĵoj kaj multaj aferoj en la mondo por solvi, sed ne forgesu nin!

Ni estas okupataj dum preskaŭ 50 jaroj. Estas absurde, ke nia tempo ankoraŭ ne venis.

– Ni atendas, ke Svedio parolu per forta voĉo en UN kaj EU.

– Ekde novembro 2020, la milito revenis. Ĝi kostis al ni multe. Tamen ĝi ne atentigis la problemon de Okcidenta Saharo.

– Samtempe plimalboniĝis la situacio en la okupata parto de Okcidenta Saharo. Jam de tri jaroj kaj dum la pandemio, Maroko blokis ĉian aliron. Neniuj bildoj aperas, fariĝas pli malfacile por la okcidentaj saharanoj rezisti kaj tiuj, kiuj faras, estas perforte punitaj. Unu el ili estas Sultana Khaya.

– La sendito de UN Staffan de Mistura faris duan viziton al la regiono en julio. Li komencis en Maroko kaj intencis viziti la okupatan parton de Okcidenta Saharo de tie. Sed kiam Maroko volis provizi al li per marokaj interpretistoj kaj kunuloj, li nuligis la viziton. Kion vi diras pri tio?

– La UN-sendito havas tre malfacilan taskon. Maroko neniam permesos sendependan vojaĝon en la okupatan teritorion.

– Maroko ne estas serioza. Polisario kompromisis, sed Maroko donis nenion returne. Ĉi tio estas kontraŭleĝa okupo! La okcidentaj saharanoj havas sian rajton.

– Kio estas la intertraktado, se UN ne garantias, ke Maroko prenas la tutan procezon serioze?

– Dum tiu tuta tempo ekde la okupado komencita en 1975, Maroko povis akiri



tempon, ekspluati la naturresursojn de Okcidenta Saharo, plifortigi sian militforton kaj samtempe fari krimojn al homaj rajtoj kontraŭ la okcidenta sahara loĝantaro.

– Se ni lasos Maroko elturniĝi kun okupado, etna purigado, malliberigo kaj torturo, kian mondon ni ricevos? Ĉu mondo, kie la fortaj manĝas la malfortajn?

– La milito daŭras. Sed ni estas paciencaj kaj ni daŭrigas. Por ni estas nur unu afero, nia absoluta rajto je propra lando.

– Maroko devas esti elstarigita kiel respondeca por la okupado. Se tio ne okazos, aliaj landoj faros la samon.

Senia Bachir mem faris interesan vojaĝon. Ŝi naskiĝis en la okcidenta saharaj rifuĝejoj en 1988. Ŝia patro estis trejnita kiel kuracisto en Kubo kune kun grupo de aliaj okcidentsaharaj junularoj de la rifuĝejoj. Iĝi kuracisto kiel ŝia patro estis unu el la unuaj revoj de Senia. Ŝi volis "helpi sian popolon". La studoj iris rekte supren; en la rifuĝejoj, ĉe mezlernejo en Alĝerio kaj al prestiĝa posteno ĉe la medicina fakultato en Alĝero.

Sed samtempe ŝi ricevis oferton por loko ĉe la Ruĝa Kruco Nordia (UWC) de United World College en Norvegio.

Ĝi estas internacia dujara edukado, por kiu Senya ricevis plenan stipendion. Ŝi diris ne al la Medicina Fakultato kaj jes al UWC kun la ideo, ke internaciaj kontaktoj ankaŭ estas

maniero "helpi ŝian popolon". Sekvis studoj en universitato pri natursciencoj; biologio kun bakalaŭro kaj magistro.

Dum ses jaroj, Senia laboris kiel politika konsilisto de la prezidanto de la Komisiono de

Afrika Unio. Tie ŝi estis unu el ok konsilistoj kaj do reprezentanto de Okcidenta Saharo, kiu ekde 1982 estas plena membro de la Afrika Unio.

Lena Thunberg, www.vastsahara.net

Historio de la unua sukerkubo en la mondo

Kompilis helpe de retaj informoj kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa resp.

Dolĉigi teon aŭ kafon antaŭ preskaŭ 180 jaroj ne estis tiel facila kiel nun. La dommastrinoj unue devis diserigi la sukron por kuiru uzo al pli malgrandaj pecoj de sukera konusforma

granda peco ĝis 1,5 m alta. Tio tute ne estis facile, precipe por virinoj. Ili devis uzi specialan fendilon, kiu ebligis kaj faciligis tiun laboron – vidu la bildojn sube:



Sukerbetaj radikoj

Vi povas vidi, ke dekstra parto de la fendilo fakte estas hakilo, maldekstra parto servas kiel malgranda marteleteto.


Kiam, kie kaj kial unue aperis sukero en formo de sukerkubo

Post la fino de napoleonaj militoj, en la 1820-aj jaroj, la Habsburga monarkio renovigis eksperimentojn kun la produktado de sukero el sukerbeto. En la 1840-aj jaroj okazis en Eŭropo industria revolucio, kies efiko estis

precipe rimarkebla en lokoj kie edukita nobelo staris ĉe la kapo. Tia persono estis ankaŭ Karl Anton Maxmilian Dalberg (1822–1908) – loĝejo de lia familio fariĝis **la kastelo en Daĉice** (*legu: Daĉice*).



Kastelo Daĉice



Ĉeĥa respubliko (Bohemio, Moravio, Silezio)

La unua sukerfabriko de la moderna periodo en tiu ĉi parto de iama Habsburga monarkio (vidu mapon de nuna Ĉeĥa resp.) estis fondita en 1829 en la vilaĝo Kostelní Vydří apud Daĉice en la bieno de Karl Maxmilian

Dalberg. Pri la establado zorgis du fratoj Tomáš (= Tomáš) kaj František (= František) Grebner(oj). Sed la grundo ĉirkaŭ Daĉice ne estis tro taŭga por kultivado de sukerbeto. Tial la sukerfabriko mem ne longe daŭris en

Kostelní Vydří kaj jam en 1832 ĝi devis ĉesian funkciadon.

Tamen, la entreprena agado de František Grebner (1791–1851) ne finiĝis per fiasko de la sukerfabriko en Kostelní Vydří. En 1833, kun la financa subteno de la viena bankisto **Karl von Puthon** (1780–1863), li establis sukerrafinejon rekte en **la urbo Dačice**. Komence, ĝi prilaboris nur kansukeron importitan de la itala ŝiphaveno Triesto, sed post 1844 ĝi prilaboris ekskluzive betsukeron de hejmaj fontoj. En 1839, aliflanke, la firmao renkontis monmalfacilaĵojn. Printempe de 1840 tial estis vokita el Vieno al Dačice Jacob Christoph Rad (1799–1871) por iĝi la

direktoro de la loka rafinejo. Rad estis sendube tre teknike kapabla kaj tuj post sia nomumo li eklaboris modernigi la fabrikon.

Kun la alveno de la nova direktoro J. Ch. Rad komenciĝis la plej fama periodo de la rafinejo Dačice. Sub la nova administrado la firmao dungis tridek konstantajn laboristojn aldone al oficialuloj kaj helpkunlaborantaro. Per sukero de tiu ĉi rafinejo estis provizitaj la regionoj de Dačice, suda kaj orienta Bohemio kaj proksimaj aŭstraj limregionoj. Sukero ankaŭ estis vendata en stokejoj de la rafinejo Dačice starigita en Vieno, Peŝto (nuna Budapeŝto), Lvivo (Ukraino) kaj Brno en Moravio.



1. Unuaj skatoletoj kun sukerkuboj



2. Ĉeĥa poŝtmarko (2019) 3. Jacob Christoph Rad.



Temo: Invento-sukerkuboj (1799–1871)

Kiel vi jam scias de supre, ĝis mezo de la 19-a jarcento, sukero estis plejparte konata nur en la formo de sukerkonusoj. Ne malofte, malagrablaj vundoj okazis, kaj dolora kriego disvastiĝis de la manĝprepara ĉambro al la loko de la agrablaodoro. Simila situacio okazis iun someran tagon en 1841, kiam s-

Invento

La edzo Jacob tre interesiĝis pri la malagrabla okazaĵo kun la vundita fingro de sia edzino. Do li komencis demandi, kiajn pecojn da sukero li faru por plenumi pli da postulojn? Liaj klopodoj kulminis per la invento de premilo por la produktado de sukerkuboj. Jakob inventis specialan premilon, kiu

rino Juliana (la edzino de la direktoro Jacob Rad) venis al sia edzo kun bandaĝo sur la mano, taŭge kolera: "Rigardu, kio okazis al mi! Venontfoje ni povos detranĉi tutan fingron, ĉu mi, aŭ unu el viaj filinoj. Ĉu vi vere ne povas elpensi pli utilajn malgrandajn pecojn de sukero?!"

transformis kristalan sukeron al kuboj, preskaŭ kiel ni konas ilin hodiaŭ.

Li venis al sia edzino kaj diris: "Juliana, mi havas donacon por vi. Io, kion vi delonge deziris" kaj montris al ŝi skatoleton kun ĉirkaŭ 350 sukerkuboj: "Tio estas belega," Juliana

hurais: "... per tiuj ĉi malgrandaj kubetoj, dolĉigo estos por mi ĝojo!"

Jacob Christoph Rad konsciis pri la potencialo ofertita de sukerkuboj kaj pasigis la venontajn monatojn laborante pri la metodo de amasproduktado. Li devis solvi teknikajn problemojn kaj travivi obstaklojn metitajn de oficiala burokratio. Li finfine sukcesis en ambaŭ direktoj. Unue, li akiris imperian privilegion (ekskluzivan rajton) por sia proceduro, tiam patenton, kaj finfine, dum aŭtuno 1843, li komencis produkti en la Daĉice-rafinejo sukerkubojn por la merkato.

Jacob Christoph Rad, iama direktoro de la sukerrafinejo en la urbo Daĉice estas konsiderata la inventinto de sukerkuboj (tiama nia lando – t.e. Ĉeĥio + Moravio +

Silezio) apartenis al Habsburga monarkio (vidu mapon sur la paĝo 2). Al la fakto, ke Jacob Christoph Rad estis la unua produktanto de sukerkuboj, fakte helpis lia edzino Juliana.

La kubetoj, kiuj estis pli taŭgaj por kuiru uzo, elflugis en la mondon kaj festis grandan sukceson. Post kiam ili ricevis "aplaŭdojn" en Vieno – la ĉefurbo de Habsburga monarkio, kelkaj landoj (Prusio, Saksio, Svislando, Anglio) aĉetis koncesion por sia produktado, kaj la sukcesa kampanjo de la sukerkubo ĉirkaŭ la mondo komenciĝis. La plibonigita formo de la invento de Rado daŭre estas uzita fare de sukerrafinejoj ĉirkaŭ la mondo hodiaŭ.

Sukero venas en multaj formoj (en Ĉeĥio)

En nia lando estas sukero dividita laŭ grajna grandeco je la sukero kristala, la sukero semolina kaj la sukero faruneca (ĉeĥa branĉnormo difinas la maksimuman "grengrandecon" de ĉi tiuj individuaj frakcioj). Premado de sukerkristaloj produktas malsamajn specojn de sukerkuboj. La unuaj serioj de la sukerkuboj havis formon de kuboido proksima al kubo kun randaj dimensioj de 1,2 cm kaj 1,5 cm. Poste, la dimensioj komencis diferencii inter malsamaj fabrikantoj, kaj la formo ankaŭ ŝanĝiĝis de kubo al diversaj geometriaj formoj, inkluzive de, ekzemple, la formo de simboloj de la Rummy-kartludo – koroj, krucoj, diamantoj kaj pikoj:



Geliga sukero (por fari marmeladojn) enhavas pompektinon kaj citritan acidon krom sukero kiel geliga agento. Fajna kristala sukero estas miksitita kun citra acido por siropa sukero. Por fari bersiropon kaj ŝtonfruktasiropon, pektinazo estas aldonita al la siropa sukero por malhelpi ĝeligaĉadon. Blanka kaj bruna sukero akiriĝas el altkvalita sukero per libera kristaliĝo. Bruna sukero estas kristala sukero, kiu estas rafinita (kolorita) per melaso.

Sukero havas praktike senliman daŭremon se konservita ĝuste!!!

Meso

Unu sukerkubo kutime pezas 3 ĝis 6 g (tipe 5 g). Tamen, pli malgrandaj kaj pli grandaj sukerkuboj ankaŭ estas produktitaj, ekz. en Rusio furoras kuboj en formo de longforma prismo pezanta ĉirkaŭ 15 g. Tio rilatas al tio,

ke teo ofte estas trinkita tie per sukerkubo enmetita inter la antaŭaj dentoj. Sukerkuboj estas plej ofte uzataj por dolĉigi varmajn trinkaĵojn en centra kaj orienta Eŭropo, kaj estas malpli oftaj aliloke.

Koloro

La koloro de sukero povas esti varia, sed la plej ofta koloro estas la blanka, kiu estas

akirita per rafinado de sukero sen aldono de tinkturfarboj.



Bruna sukero



Blanka kristala sukero



Sukerkuboj



Melaso

De sukerbeto al sukero mem – koncize

En nia lando, sukero estas produktita el sukerbetoj. Post la rikolto aŭtune, la beto estas transportita de la kampo por prilaborado al sukerfabrikoj. Post purigado, la betoj estas raspataj al tiel nomataj nudelo-similaj tranĉaĵoj, el kiuj la sukero estas ĉerpita per varma akvo (70°C). La rezulta suko estas

laŭgrade koncentrita kaj poste lasas kristaliĝi. La rezultaj sukerkristaloj estas finfine apartigitaj de la siropo en centrifugilo. La preta sukero estas ordigita laŭ grajna grandeco kaj plene aŭtomate pakita por uzo en domanaroj kaj por grandaj klientoj kaj komencas sian vojaĝon al la komerca reto.

Produktado de sukero el sukerkano

Sukerkano estas kultivita de sukerkanaj plantidoj, kiuj povas esti rikoltitaj post dek unu ĝis dek ok monatoj. Ĉiu plantido povas ripete produkti ĝis sep sinsekvajn rikoltojn. Tiam ĝi devas esti anstataŭigita per la nova. Rikoltado estas farita meĥanike aŭ permane. Post rikoltado, la tranĉita kano devas esti prilaborita kiel eble plej rapide por konservi la sukeron kaj malhelpi ĝian difekton de mikroorganismoj.

Tial sukerfabrikoj troviĝas kutime proksime

de plantejoj. La sukerkano estas purigita, muelita, premata kaj poste la sukerkano estas lavata per varma akvo. La suko akirita estas filtrita, koncentrita en vakvaj vaporigiloj kaj poste submetita al kristaliĝo. La sukero tiam estas apartigita de la patrinlikvaĵo per centri-fugado. La sukero akirita tiamaniere estas parte purigita kaj haveblas en kristala, mikrobiologie stabiligita formo. Ĝi povas esti stokita kaj transportita al rafinejoj ĉirkaŭ la mondo laŭbezone.



Monumento kun granita "sukerkubo" en Daĉice

Granita monumento estis konstruita en 1983 kiel memorigilo al la 100-a datreveno de la komenco de produktado de sukerkuboj en Daĉice. En 2012, en ĝia tuja ĉirkaŭaĵo estis instalitaj memortabuloj memorantaj la jaron 1843 en dek du lingvaj mutacioj, kiam la

invento el Daĉice – kuba sukero – komencis sian triumfan vojaĝon tra Eŭropo kaj mondaj merkatoj. La monumento staras en la parko proksime de la alta renesanca turo de la preĝejo de St. Laŭrenco.



1. Karl Anton Maxmilian Dalberg



2. Blazono de la familio Dalberg



3. Simbola granita monumento kun "sukerkubo"


Kune kun Carina kaj Bellman ĉirkaŭ Hisingen

de Carina Schwartz

Oni devas iri per boato por atingi
Gotenburgon.

Ĉi tiun tagon estis boatekskurso. Mi de antaŭ
longe sopiris ĉirkaŭiri Hisingen kun M/S Carl
Mikael Bellman.

La plej bona vojaĝkunulo, pri kiu mi povis
pensi, estis mia amiko Roger, naskita kaj
kreskinta en Hisingen. Do, dirite kaj farite.
Post vespermanĝo hejme kaj kun grandaj
atendoj, ni iris malsupren sur la monton,
prenis la kaleŝon al Lilla bommen kaj ĝentile
staris en la vico.



Do, surŝipe, ni sidiĝis sur la ekstera ferdeko. La turneo komenciĝis kaj ni malrapide drivis al la Kajo de Suspiroj kaj plu al Gamlestan kaj la elfluo de Lärjeån. Laŭlonge de la riverbordo, ni vidis pecojn de arboj kiuj elstaris kiel ostoj en la akvo kaj malgrandajn, bone kaŝitajn sablajn plaĝojn. >



La gvidisto rakontis pri Kongahälla kaj Sigrid Storråda, unu el miaj absolute plej ŝatataj (ne ke ŝi estis tro agrabla), kaj la plej interesa el ĉiuj Vestrogotiaj reĝinoj.

Tio okazis dum la fortikaĵo de Bohus imponis per sia grandeco antaŭ ni. Kia vido ĝi devis esti por la danoj, kiam ili glitis kontraŭflue kaj subite ekvidis tiun ĉi gigantan konstruaĵon alte sur la klifo.

Mi ankoraŭ ne povas ne senti pikon de malĝojo, kiam mi aŭdas pri la kompatindulo,



Estis lokoj por vivi por tiuj, kiuj ne havas alian lokon por vivi. Ni vidis fiŝkaptistojn atendantajn ekmordon, preterglitis industriojn, ponton malfermiĝantan kaj multajn belajn malnovajn domojn, kiujn vi neniam vidas de la bordo. Kiam ni forlasis Göta älv, ni malrapide direktiĝis al Nordre älv. Ĝi estis magia.



kiu oferis sian vivon ekbruligante la pulvon en "Ĉapo de Patrino". Ĉio por certigi ke lia familio akirus teron kaj bienon.

La voĉo de la gvidisto eĥas tra la laŭtparoliloj. Ni preterpasas la "barieron" kie oni fermas Nordre älv, se la sala akvo de la maro fariĝas tro trudema kaj detruas nian trinkakvon. Ĝi estas malprofunda, nur du metrojn profunda en la rivero kaj ni vidas malgrandan fokon naĝi apud la boato.

Kiam ni venis iomete for, Ragnhildsholmen estas videbla en la krepuska lumo. Mi estas tute konfuzita ene. Restas 2 1/2 horoj de la vojo kaj mi estas tute plena de impresoj kaj rakontoj. Mi ne povas rakonti ilin ĉiujn ĉi tie.



Ni preterpasas la pramhaltejon kaj daŭrigas preter la norda insularo. Aŭskultas pri Bronsâldersund kaj la plej malnova bronzepoka trovo en Norda Eŭropo, "Gabriels Lycka". Loĝloko de almenaŭ 7000 jaroj antaŭ Kristo. Ĉasista ŝtonepoko!!!



Kiam ni ĉirkaŭas Lilleby kaj Sillvik, vespere la unuaj grupoj leviĝas kontraŭ la ĉielo. La lumoj sur la grupoj kaj ŝipoj kiuj estas alligitaj lumigas la ŝippasejon. Pli antaŭen, pli da grupoj, Älvsborg-fortikaĵo kaj la ponto



La urbaj lumoj estas imponegaj. Gotenburgo neniam antaŭe estis tiel bela. Ekde esti mia urbo sur seka tero, kie nur la vento atestis pri sia loko, mia urbo fariĝis marborda urbo, vera havenurbo.

Kvankam mi estas terulo, mi nun sentis, kiel devas esti la sento de maristo proksimiĝanta al haveno. Sur boato malrapide drivanta al la kajo, mi unuafoje vidis mian propran hejmurbon rekte de la akvo. Alte sur la altaĵoj de Kortedala leviĝas la "ŝipoj", la domoj, kie mi loĝas. Estis kiel esti brakumita de la urbo, alvenante en havenon post longa vojaĝo.



Kiu estas Carina Schwartz?

Ŝi estas patrino, persona asistanto, libertempa edukisto, ĵurnalisto, projektlaboristo kaj havas entuziasmon por flamenko, ĉevaloj kaj obstaklokuroj. Ŝi loĝas en Kortedala en Gotenburgo.

Bildoj: C. Schwartz

La ĉaskastelo de la reĝino Kristina

aŭ "la perlo de Otterhällan"

De Ingegerd Granat

Estas eble kaŝite en la nebuloj de Gustavo II Adolfo ĉu la domo, kiu estis konstruita en 1670 fare de kolonelo Börje Drakenberg, estis nomita laŭ reĝino Kristina aŭ ne. Tio eble estas io, kion neniu povas vere scii hodiaŭ. Oni tamen scias, ke reĝino Kristina loĝis en Romo kaj estis katoliko dum longa tempo antaŭ ol la domo estis konstruita.



Estas ankaŭ konate ke Börje Drakenberg servis al Gustavo II Adolfo dum la longa milito kaj tiam lia nomo estis Börje Nilsson. Reveninte li estis nobeligita de la reĝino Kristina kaj prenis la nomon Drakenberg.

Lia edzino ankaŭ portis la nomon Kristina, do eble ambaŭ estis vidataj kun dankemo de Drakenberg. Ĉiukaze la domo servis dum la 18-a jarcento kiel taverno por la soldatoj ĉe la proksima bastiono Christina Regina.



En 1914, la tiam kaduka ĉaskabano estis aĉetita fare de la velocipedoproduktanto Alfred Hansson. Li interalie metis la leonmaskaronojn super la fenestrojn ekstere. Ili venis de la artileria kazerno ĉe Kungshöjd, kiu estis disfalgita en 1911. Eble la bicikloproduktanto sciis ke reĝino Kristina konservis sian propran leonon en la palaco Tre Kronor en Stokholmo. Ekzotikaj bestoj kaj bestaj instigoj estis popularaj en la reĝa sfero tiutempe.

Ju pli vi legas pri reĝino Kristina, des pli ŝi aperas kiel fortvola kaj decidema virino, rifuzis edziniĝi, rifuzis naski infanojn, abdika'is kaj finfine estiĝis katoliko kaj ekloĝis en Romo.

Sed la katolikaj gvidantoj eksciis, ke la sveda reĝino havas postulojn por sia vivo. Ĝi kostis monon kaj ŝi ankaŭ celis fariĝi reĝino en iu alia lando por vivi la vivon. Alivorte, ŝi vivis alte kaj esprimis tion mem: "mi preferus esti en ŝtormo ol en trankvilo".

Ja reĝino Kristina ankoraŭ estas mita persono, do certe estas ekscite imagi, ke ŝi venas galope rajdante sur ŝaŭma ĉevalo kun sabro en plena svingo por forpeli la

hodiaŭajn malkonstruantojn. Ĉar la minacoj estas multaj kaj la intrigo estas dezirinda por tiuj, kiuj volas gajni monon en la hodiaŭa Gotenburgo.

Miaflanke mi esperas, ke la Ĉaskastelo de la Reĝino Kristina povas resti tie, kie ĝi estas kaj

disvastigi feliĉon en alia tia pavimita medio. Kial vera "Kafejo" ne povas fariĝi realaĵo?

Ke la "Perlo de Otterhällan" estu konservita kaj respektata por la estonteco. /Ingegerd

Malnova afiŝo pri la diversaj horoj bezonataj por flue paroli fremdajn lingvojn

Francoj estas ja en la fokuso. Por ili Esperanto estas facila, ĉar multaj latindevenaj vortoj troviĝas en ambaŭ lingvoj.

Por svedoj? Eble oni aldonus 100 horojn, sed ankaŭ ni havas ja multajn internaciajn vortojn.

Do, jen la listo. Francoj kaj certe kelkaj aliaj popoloj bezonas:

- 2200 horojn por lerni paroli la ĉinan
- 2000 horojn por la germana
- 1500 horojn por la brita kaj la usona angla kaj
- 1000 horojn por lerni la hispanan, sed nur
- 150 horojn por lerni Esperanton.

Ĉu vi havas komentojn?

/Siv



Kelkiom el esperantista vivo

de Bertil Nilsson

Dum la printempo kaj somero 1986 ĝenis min sento, ke mia plumotivado por esperanto dreniĝis. Ne profunde mi analizis tion, nur pensis ke bone, ekzistas aliaj interesaj aferoj en la vivo. Tamen, mi jam estis min preparinta por partopreni en evento, kiu prezentiĝis kiel io nova, nome Kultura Esperanta Festivalo. Ĝi okazu en aŭgusto 1986 kaj mi decidis, ĝi estos la lasta esperanta evento, kiun mi vizitos.

Tamen, partoprenante mi travivis alidecidiĝon. Du aŭ tri aferoj kaŭzis tion. Unu el ili mi aparte memoras. En konversacio kun juna SEJU-ano li diris: "Ankaŭ en la

esperantistaro troviĝas diversaj subkulturoj." Poste, konversante kun alia esperantisto mi estis atentigita pri artikolo de amiko Probal Dasgupta en Revuo Esperanto de UEA, kie li negative recenzis iun novan esperantistan fenomenon.

Temis pri tiuj ideoj, kiuj ekis ĉe esperantistaj studentoj en Pollando kaj manifestiĝis en la 36-a IJK en Raŭmo en 1980 kaj ricevis la nomon "raŭmismo". Dudek jarojn poste, je la jarcentŝanĝo, la raŭmismo ricevis organizan formon en la Esperanta Civito kaj la nunaj raŭmistoj difinas siajn ideojn jene:

Raŭmo (finne Rauma) estas urbo de la mezepoko, 92 km norde de Åbo (Turku). Por esperantistoj ĝi estas konato pro "La Manifesto de Raŭmo.



Bildoj el Wikipedia.

"Raŭmismo aplikas al esperanto la modernan lingvistikan principon, laŭ kiu vivanta lingvo estas kaj komunikilo kaj identigilo. Zamenhof mem jam konsciis pri tio, proponante hilelismon/homaranismon kiel mondpercepton kaj parolante kiel unua pri la ekesto de esperanta popolo. Kiel prezentite en esejo de Walter Zelazny, tiu pensofluo konstantis ĉe la esperantistaro, ĝis populariĝo tra la Manifesto de Raŭmo (1980) kaj postaj eventoj. La Esperanta Civito estas la konsekvenca realigo de raŭmismo, unika pro sia institucia karaktero."

<https://www.esperantio.net/index.php?id=8>

Do, estas mond- kaj vivkoncepto, kiu kontraŭas naciismon, estante nenaciisma kaj sekulara analogio al la homaranismo de Zamenhof. Kvankam mi estis fidela leganto de la Revuo Esperanto, mi evidente maltrafis la artikolon de Dasgupta.

Ekde tiam pasis multaj jaroj kaj mi havis eblecon familiariĝi kun novaj konceptoj. Ekzemple al la koncepto ke registaroj kaj parlamentoj decidu pri "internacia lingvo". Zamenhof estis skeptika kontraŭ tio. Kiel judo li apartenis al splitiĝinta religia popolo, sen nacieco sed kun pluraj lingvoj. Lia origina ideo estis doni al ili unu propran komunan lingvon samtempe uzeblan kiel interpopolan lingvon.

Nur kiam li malsukcesis en sia unua ambicio, okazis ke la "gojoj", t.e. nejudoj, lanĉis esperanton kiel ekskluzive internacian lingvon inter naciaj ŝtatoj. Tion Zamenhof akceptis sen protestoj, kvankam tio ne estis lia praelo. Ankaŭ konceptoj kiel raŭmismo, civitano, anticivitisimo, finvenkismo, Tyresö-generacio kaj multaj aliaj ekevidentis al mi. Iom post iom kun kreskanta surprizo kaj kompreno mi eksciadis, ke mi dum longa tempo maltrafis valoran parton de la esperanta kulturhistorio. La drenado de mia motivado en 1986 estis simptomo, ke mi estis fremdiĝinta disde la finvenkismo, kiu en tiu tempo estis la gvidlinio en tiu parto de la Movado, kiun mi konis.

Nun, leginte la raportojn de la ĉi-jare resurektinta **KEF**, fondiĝas mia konvinko ke ĝuste tiaspecaj eventoj kaj kunvenoj gravegas en la klopodado krei tian esperantan popolon, kies unua semeto vidiĝas en la ruslingva kajereto "Interpopola lingvo" de Zamenhof, publikigita en 1887.

Tiu kajero estis jam en 1889 tradukita en la svedan de la studento G. Henriclundqvist. Pri li oni povas legi en "Ystadiana 1987", eldonita de Ystads Fornminnesförening. Lia traduko estis reeldonita kiel faksimilo en 1987.

Leginda estas ankaŭ la eskvizita libreto pri li de Ulf Thomas Moberg kun la titolo *"Sébastien Voirol – en svensk spindel i det franska kulturlivet"*. Gustav Henric Lundquist (post sia elmigro al Francio ŝanĝis sian nomon al Sébastien Voirol) verŝajne estis la unua esperantisto en Svedio. La verketo de Moberg tamen ne mencias lian esperantistecon, kvankam lia esperantista aktiveco pludaŭris. En malnova numero de La

Espero, mi vidis, ke membro kun la nomo Voirol en esperanta klubo en Neuchatel, Svislando, donacis monon al la sveda movado. Verŝajne temis pri filo aŭ nepo de Sébastien Voirol.

La libron oni facile trovas Interrete. Antaŭ kelkaj tagoj mi rimarkis, ke ĝi estis ofertita en librobrokantejo je la kosto de 200:–.

Bertil Nilsson

Renkonti 33 gelernantojn en gimnazia klaso en Schillerska, Gotenburgo

De Siv Burell

La 1an de septembro mi renkontis Anna Nordström Berle ekster la gimnazio. Ĉiuj pordoj estas ŝlositaj, ĉar oni ne volas fremdulojn, pri kiuj oni ne scias kial ili troviĝas en la lernejo. Anna instruas pri la latina, itala, sveda, sveda kiel dua lingvo kaj pri fako nomita "La lingvoj de la homo".

En tiu lasta fako oni lernas pri la minoritataj lingvoj. Ili estas: la finna, meänkieli, la samea, romani ĉib kaj la jida. Tiuj kvin lingvoj havas pli da rajtoj ol aliaj minoritataj lingvoj. La sveda surdlingvo/signolingvo havas similan statuson, do eble ni povas diri ke la signolingvo estas la sesa minoritata lingvo kun leĝaj rajtoj (pri tradukado, pri lingvo en la lernejo kaj pri traduko de oficialaj skriboj k.t.p.). En "Människans språk" ("La lingvoj de la homo") oni ankaŭ lernas pri planitaj lingvoj, kaj pro tio mi estis en la lernejo hodiaŭ por informi pri Esperanto.



La leciono ampleksis 70 minutojn. En studrondaj fakoj por plenkreskuloj unu leciono ampleksas nur 45 minutojn. Ho, mi certe devis varii mian informon – rakonti, montri Power Point-bildojn kaj lasi ilin diveni tekston kun multaj vortoj similaj al la sveda. Fakte ili ne aspektis lacaj.

Mirinde estis aŭskulti kiam ĉiuj 17-jaruloj ĥore legis A, Bo, Co, Ĉo, Do..... Mi ekpensis pri Ĉinio aŭ Kongo, landoj kiuj certe havas 33 gelernantojn – aŭ pli – en la sama klasĉambro. Je mia ĝojo Anna diris, ke ili daŭrigos pri Esperanto lunde, uzante la materialon, kiun mi donis al ili.

Ĉu vi vere amas katojn?

De Ingegerd Granat

Äkta Kattälskare

Ligger i samma ställning hela natten,
eftersom katten blir irriterad om man vänder sig

Tittar på dåliga tv-program, eftersom katten ligger
och sover på fjärrkontrollen

Väntar med att bädda sängen tills katten
behagat stiga upp

Kravlar ur sängen via huvud-/fotändan,
för att inte störa sin sovande katt

Sover utan huvudkudde, eftersom katten
vill ligga på den

Står upp framför datorn, eftersom katten
ligger och sover i stolen

Mi trovis en fejsbuko tiun ĉi tre veran artikolon. Fakte mi amas katojn tiel multe ke mi sekvas ĉi tiujn katoregulojn. Fojon post fojo la kato regas. Mi estas vera sklavo de mia kato!

- Mi kuŝas en la sama pozicio dum la tuta nokto ĉar la kato estus ĝenita se mi turnus min.
- Mi ofte spektas malbonajn televidprogramojn ĉar la kato kuŝas kaj dormas sur la televidregilo.

- Atendas pretigi la liton ĝis la kato degnas ellitiĝi.
- Rampas el la lito per la kap-/piedfino por ne ĝeni la dormantan katon.
- Mi dormas sen kapkuseno ĉar la kato kuŝas sur ĝi.
- Mi ankaŭ fakte staras ĉe mia komputilo ĉar la kato kuŝas sur la seĝo.

Jes mi vere estas katamanto kaj mi ĝojas pro tio!



Mirinda Prago!

Joko Macuda skribas:

“Mia filo vidis ESPERANTO skribitan sur la brikojn en Praha”.

La meteologia prognozo certe diris:
Neniu pluvo!

/Siv

Junaj artistoj havas grandan fantazion

Tiuj ĉi bildoj estas nur kelkaj el ĉiuj, kiujn mi trovis sur la asfaltitaj padoj dum posttagmeza promeno. Kiam pluvas la bildoj malaperas, kaj la artistoj devas rekomenci.

Bonan humoron la bildoj donas al mi!

/Siv



”Fiolmannen” – La viro kun la violono

De Ingegerd Granat

”Fiolmannen” estis originalulo, kiu dum 50 jaroj vagis en Gotenburgo. Lia vera nomo estis John Eriksson kaj li naskiĝis en Ytterby la 15:an de junio en 1896.

Oni facile rekonis lin, ĉar li estis vestita en ŝuoj el kaŭĉuko sen ŝtrumpoj, fadenmontraj pantalonoj kaj griza kaj mezlonga surtuto. Longa hararo kaj alta harrando, markitaj vangostoj kaj makzelosto. Li neniam parolis kun iu.

Li hastis rapide inter la ejoj kie li ludis. Li ludis skuante la violonon kaj foje li finis meze en la melodio. Foje li ludis en bona maniero, sed kelkfoje en malbona maniero laŭ atestoj. Li estis ankaŭ akrobato kaj uzis multajn diversajn ludpoziciojn kiam li ludis. Kuras la famo ke li foje ludis en Cirko kaj tiam al kroĉiĝis per la dentoj kiam li ludis.

John Eriksson studadis por esti elektristo kaj laboris ĉe SKF dum tempo. En la jaro 1925 li fariĝis maristo. Dum vojaĝo li estis infektita de malario kaj devis fini la maristan vivon. La malsano lezis la cerbon kaj John Eriksson estis pli kaj pli timema kaj neatingebla.

Se vi okaze venas al Gotenburgo kaj iras per tramo, eble vi vojaĝus per vagono kiu estas nomita "Fiolmannen". Pro ĉi tiu vagono li daŭre estas sur la stratoj kaj rememorigas pri la iama violonisto kiu trotaĉis en lia speciala maniero.

John Eriksson pasigis sian lastan tempon de la vivo en maljunulejo en Fjällbo kaj mortis la jaron 1990. Nun li kuŝas en la tombejo Kviberg kune kun sia violono kaj arĉo.

Ĉu vi havas memoron pri "Fiolmannen"? Almenaŭ se vi estas Gotenburgano!



Svedaj pioniraj virinoj



9. Elsa Andersson (1897 – 1922) – la unua sveda virino kun licenco pri aviado kaj la unua virina paraŝutisto.



1920 Elsa Andersson en la aviadlernejo de Thulin.

En 1920 ŝi ekzameniĝis pri aviado kaj ricevis diplomon numero 203. Ŝi ankaŭ volis fariĝi paraŝutisto. La sola spertulo pri tio en Svedio ne volis instrui virinojn pri tiu sporto. Elsa iris al Berlino kaj partoprenis kurson kun teorio kaj du paraŝutaj saltoj. En 1921 ŝi

ekzameniĝis kiel paraŝutisto. Bedaŭrinde ŝi mortis je ŝia tria publika salto. Tio okazis proksime al Askersund kun granda publiko.

Ŝia vivsorto fariĝis kaj libro kaj filmo.

10. Margit Nordin (1897 – 1982) – la unua virino kiu faris la "Vasaloppet" – skikonkurso je 90 km inter Sälen kaj Mora en Dalekarlio.

En 1923 ŝi partoprenis, sed post la konkurso oni malpermesis al virinoj partopreni.

La malpermeso ĉesis nur en 1981. Tamen okazis ke virinoj vestis sin kiel viroj kaj partoprenis.

Profesie, Margit estis diplomita instruisto pri gimnastiko.
/Siv



Ĉe la enigmo de vivkreiĝo...

La lasta parto en nia serio de noveloj de Aira Kankkunen

– Mi memoras, kiam oni konstruis tiun domon.

– Vi nenion memoras. Vi estis tiam en la subtegmento manĝante ĉifonojn.

Plurfoje la memorbildojn de Maria oni nuligis menciante la tempon de ĉifonmanĝado kaj ja tiutempajn aferojn oni ne povas kontraŭagi,

ĉar ili estas faktoj, same kiel tio, ke Matti-mortinto ne vidis la okazaĵon. Li jam estis en la tombo longan tempon, kiam oni malkonstruis la domon. La naskiĝintoj kaj mortintoj estas notitaj en la paroĥa registrolibro. Estas vane debati pri tiuj aferoj. Sed – la tempo de ĉifonmanĝado estas por Maria enigmo.

Estas stranga tempo tiu ĉifonmanĝadtempo, cerbumas Maria, ĉar tiu tempo havas nekonatan komencon. Kiamaniere la homsejoj komencas la ĝermadon kaj poste vivas tie? Homplantoj ne estas videblaj. Tamen estas vere, ke la vivo devenas el la subtegmentaj ĉifonoj; tiel ofte oni menciis tiun tempon, ke ĝi devas ekzisti. Sed – la tempo havas iun misteron; tion Maria komprenas rigardante la vizaĝojn de plenaĝuloj, sed – tio estas ĉio, kion ŝi scias. Ŝi decidas eniri la subtegmenton por esplori la ĉifonojn.

Ho! Tiom multe da ĉifonoj! Kompreneble, ĉar dek ĝermintoj konsumas vestojn. Troviĝas grundo por la dua deko, eble ankaŭ nun ekzistas kelkaj ĝermantoj. La ĉifonoj estas en apartaj korboj:

en la unua – blankaj, en la dua – unukoloraj kaj en la tria – plurkoloraj miksĉifonoj. Troviĝas ankoraŭ korbo por prettonditaj ĉifonbuloj. La patrino diradis, ke oni ne miksu tiujn korbojn. En tiuj buloj neniu povas vivi, pensas Maria, ĉar tiel senindulge oni manipulis la ĉifonojn tondante ilin kaj krome ili ja estis boligitaj en tinkturo. Tiam vere ĉiuj homsejoj mortis. La plantejo por kreskado de homplantoj devas esti ie en alia korbo – aŭ eble ĉie. En la blankaj ĉifonoj sendube kreskas blankaj infanoj, kiuj mortos infanaĝe kiel Reijo de la familio Laine. Li estis blanka kiel neĝo. Oni nomis lin neĝpigo. Ankaŭ unu el niaj infanoj mortis. Eble li ĝermis en la blankĉifona korbo, ĉar ĝi vivis nur kelkajn tagojn. Oni ne devas preni infanplantojn el la blankamaso, aŭ – eble oni ne povas elekti. Oni devas preni tiun, kiu estas ĝerminta. Almenaŭ en nia hejmo la ĝermado en la blankĉifona korbo disvolviĝis malbone, ĉar nur unu estis mortinta... Tiu ĉi plurkolora mikskorbo estas plej bona. En ĝi troviĝas



multaj koloroj kaj ne nur unukoloraj ĉifonoj, sed eĉ en la sama ĉifonpeco estas diversaj koloroj. Estas multe da materialo. Se iu devenas el miksĉifonoj, tiam li estas plurkolora; troviĝas tie bluo kaj ruĝo kaj kelkfoje estas ĉiuj koloroj kiel kaoso. Ho! – Mi esperas, ke mi estus ĝerminta en la miksĉifonoj – tiam mi havus varian vivon! La unukoloraj homoj vere havas monotonan vivon, eĉ se iliaj koloroj estus belaj. Ili ja ĝermas kaj kreskas kune kun la unukoloraj kaj supozas, ke nur ilia koloro estas la sole vera.

Ili ne komprenas aliajn. Sed... tiu ĉi miksamaso! – tie estas variadoj! Sed ĉiuj koloroj ne estas belaj, eĉ ne en tiu amaso. Ekzistas ankaŭ nigraj ĉifonoj... kiel ĉerko kaj kiel preĝeja kaptuko de la najbara mastrino. Maria rigardas

al la nigra ĉifono kaj timtremas. La morto enhavas multe da timo... Troviĝas ankaŭ infero, pri kiu la avino multfoje parolas. Ankaŭ la infano, fariĝante 6-jara, povas hazarde glitfali en la inferon, se ĝi ne pensas pri siaj pektoj. Maria timatendas la 6-jaran naskiĝtagon, sed tamen ŝi ne pentos, ĉar tiam oni ne povas ĝoji. Pri ĝi ofte memorigis la avino. Se iu estas gaja kaj ridas, kiel ankaŭ la avino mem faras – tiam ŝi, ridante sian lastan ridadon, ekdiras: Ne ridu, eble vi jam morgaŭ mortos! Tiamaniere ŝi diras, kvankam la homoj povas vivi ĝis centjaraj. Sed – ne ĝoju, nur pensu pri la morto. Kaj kio do okazas, kiam infano mortis? Tiam ĉiuj sopiras kaj ploras kaj kapjesante diras: Estas bone, ke li povas transloĝiĝi for de ĉi tiu malbona mondo... Kial ni devas naskiĝi, ĉar la mondo estas tiel malbona kaj oni devas pensi nur pri la morto? La plenaĝuloj mem kolektas ĉifonojn farante la fundon por novaj infanoj... Kiam mi plenkreskos, mi ne kolektos la ĉifonojn.

Maria metas la nigran ĉifonon suben en la korbopondon. Oni ne bezonas ĝin ĉiam rigardi. Ŝi sortimentas ĉiujn ĉifonojn. Ĉiuj nigraj estas nun sube. Estos almenaŭ komence pli belkolora tiuokaze, ke ĝermos novaj, pensas Maria.

Ĉiun korbon Maria traserĉis – por sekureco, ankaŭ la tonditajn bulojn. Ŝi ne trovis homplantojn. Kontente ŝi rigardas sian laboron; neniu nigra ĉifono estas videbla. Sed... la kontento ŝanĝiĝas en malcertecon. Se... ili... komencas... ĝermi... funde, tiam ili estos nigraj, kvankam ili kreskos trans la kolorajn ĉifonojn. **Kiu iniciatas ilin?** La rigardo de Maria maltrankviliĝas. Ĝi ĉirkaŭiras la helan parton de la granda subtegmento, ĝi provas iri ĝis la plej malhelaj anguloj kaj ree al la sabla parto. Sablo... kiel en la tombejo. Sur la sabloplanko estis homostoj tiam, kiam nia familio transloĝiĝis ĉi tien kaj ankaŭ hantis. Maria ne ĉeestis tiam, ĉar tiam ŝi vivis en la tempo de ĉifonmanĝado, sed tiamaniere la plenaĝuloj diris. Maria aŭdis fantomrakontojn per siaj propraj oreloj.

La timo fortiĝas. La ĉifonoj moviĝas! La movoj komenciĝis el la fundo. Angorsente ŝi fiksrigardas la korbojn. Ili vere moviĝas. Subite ŝi forkuras direkte al la ŝtuparo, sed tie ŝi haltas. La koro bategas. Ŝi faris nepermesitan aferon. Ŝi provis solvi la enigmon de la naskiĝado. Ne faru tion! La ĉifonamasojn ne miksu! Ŝi pekis, sed tamen ŝi ne pliboniĝos... ne... efektive ne. Ŝi rakontos al neniu. Ne gravas, ĉar la 6-jara naskiĝtago estos daŭre estontece. Ŝi reiras en la subtegmento. La subtegmento allogas. La tentanto vere frustras ĉe la orelo. Tamen la timo venkas, sed Maria murmuris:

– Mi solvos la enigmon de la naskiĝado... antaŭ mia 6-jara naskiĝtago. Certe mi devenas el la mikscifonoj, ĉar mi volas scii ĉiajn aferojn.

Maria subeniras... malrapide kvazaŭ ŝi volus spiti la timon. Tamen estas plej bone elpeli la fantomojn, ŝi pensas kaj komencas la psalmon: *En Via ĝardeno ĉielblua, mi estas eta planteto...*

El Kaj tiam floris la ĉerizarboj... 1997

Kometo en Muminvalo

Sten Johansson esperantigis – kaj esperantigos – la sep librojn en la Muminserio. En la biblioteko de Stannum troviĝas "Muminvalo, la nevidebla infano kaj aliaj rakontoj", tradukita de Eckhard Bick en 1984. La finna verkistino Tove Jansson skribis svedlingve. Sur la lasta paĝo de tiu libro mi legas: "Ŝiaj Mumin-libroj, pro kiuj ŝi ricevis la internacian H.C. Andersen-premion, prisorĉas infanojn kaj plenkreskulojn same multe, ĉar ili tuŝas ties komunajn spertofontojn." Nun Sten Johansson per Facebook anoncas sian unuan Muminlibron – kaj sekvas pliaj. Bonege! /Siv

El Facebook:

Kometo en Muminvalo, la unua libro en la

Muminserio, estas nun disponebla en Esperanto, tradukita de Sten Johansson kaj eldonita de Esperanto-Asocio de Britio kun helpo de Fondumo Esperanto en Finnlando!

Amazon jam ofertas ĝin, kiel ankaŭ Book Depository, kiu hodiaŭ vendas ĝin kontraŭ 13,35€, kun senpaga internacia aŭfranko! [...]

Aperos la dua, *Ĉapelo de sorĉisto*, eble en frua 2023.



<https://www.bookdepository.com/Kometo-en.../9780902756564>



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

Enhavo:

107-a UK – Maskerado
en ĈRo 3 – Mesaĝo de
UEA – Eŭropa kongreso
2024 – La vivo povas
aspekti tiel – Rememoro
– Trista anonco

Kun intereso mi legas tiun ĉeĥan gazeton! Ĝi ĉiam havas kaj informon pri kio okazas en Esperantujo kaj pri okazaĵoj en Ĉeĥio.

Vere leginda!

Mi legas en la septembra *Informilo* ekz:

- ke estis 837 aliĝintoj el 56 landoj en la Universala Kongreso en Montrealo. Ili venis de 56 landoj
- la temo de tiu UK estis La Internacia Jardeko de Indiĝenaj lingvoj (2022–2032)

Oni diskutis pri la rilatoj inter lingvo, vivmaniero, ekologia scio, indiĝenaj rajtoj kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

Sube vi havas informon se vi volus aboni la gazeton. /Siv

INFORMILO – monata gazeto por
esperantistoj-handikapuloj + suplemento
ANTAŬEN

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-
handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených
esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

Internacia literatura Esperanta konkurso "Hristo Gorov-Hrima" – 2022

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto kaj eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton

per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman – 12 punktaj.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso: e-mail:

modest@abv.bg

Georgi Mihalkov

Veckovisa esperantokurser online (på engelska)!

Från deras hemsida:

Funderar du på att lära dig och öva esperanto, det internationella språket? Du har kommit till rätt ställe! **London Esperanto club** erbjuder veckovisa esperantokurser online från nybörjare (A1) till avancerade (C1) nivåer. Du kan läsa mer om dessa olika nivåer på Wikipedia.



Vi kan också hjälpa dig att förbereda dig för den officiella esperantoexamen (B1-, B2- och C1-nivåer) som vanligtvis hålls i juni online och på många platser i världen inklusive London.

Våra onlinekurser äger rum med Zoom en gång i veckan i en timme. Alla är välkomna men anmäl dig bara om du vet att du kommer att kunna delta de flesta veckor då antalet deltagare i varje grupp är begränsat till ca 15 personer.

Kurser:

Nybörjarkurs (A1-A2-nivå)

Grammatiksessioner (A1-A2-nivå) – hålls av Anna Löwenstein

Läskurs (A2-B1-nivå)

Efter nybörjarkurs (A2-B1-nivå)

Fortsättningskurs (B1-B2 nivå)

Fortsättningskurs (B2-C1 nivå)

Skrivkurs (A2-C1-nivå)

Konversationssessioner

En fråga om våra kurser? Kontakta oss gärna:

<https://londonaesperantoklubo.com/Kontaktto.html>

Nia amikino de la librorondo

Laure Patas d'Illiers, aktivas pri esperanto-ekspozicio en Parizo.

Didier Loison fotis.

